

Okaze de la Tago Internacia de la Gepatra Lingvo: ĉu indiĝenaj lingvoj de Ameriko malaperas?



Nuna situacio pri indiĝenaj lingvoj en Ameriko

Februaro estas la plej bona monato por ke ni ĉiuj, portantoj de esperanto kiel komunika lingvo, revigligu la defendon de ĉiuj lingvoj kaj dialektoj parolataj tra la mondo.

Fakte ne nur en februaro ni tion faru, sed ĉiun 21-an de februaro oni celebras la internacian tagon de la gepatra lingvo kun la celo savgardi kaj protekti lingvojn.

La tagon proklamis la ĝenerala konferenco de Unesko en novembro de 1999, sed ok jarojn poste, en 2007, la ĝenerala asembleo de UN, proklamis ĉin oficiale. Jam en la jaro 2 000 la tiama ĝenerala sekretario de UN, Kofi Annan subtenis ĉian celebradon.

Lige al tiu ĉi Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, ni volas iomete alproksimiĉi al tiu ĉi temo en nia Amerika Kontinento, pli konkrete al tio, kion ni latinamerikanoj nomas Nia Ameriko.

Alproksimiĉi al la hispanamerika mondo, estas iom kompleksa tasko, tiel ke unuflanke dominas la hispana a? kastilia lingvo, oficiala lingvo en granda parto de la kontinento.

Jam en la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento oni iniciatis en nia regiono, edukajn programojn novigajn kiel la Interkultura Edukado Dulingva kiu alprenis diversajn formojn kaj variantojn la? la kuntektoj socihistoriaj kaj socilingvistikaj.

Oni konsciiĉis pri la plurlingva karaktero de la amerika indiĉena mondo, kio nun estas tre evidenta, kaj pro tio ne eblas imagi demokratian politikon rilate la originajn popolojn sen emfazi la prilingvajn aspektojn. Beda?rinde, la reala situacio de originaj popoloj kaj lingvoj montras ke en la praktiko, la situacio estas ege riska.

Oni ne nepre bezonas fokusiĉi al specifaj landoj, ĉar estus preferinde skizi gvidliniojn kiuj provizas ian sencon kaj karakterizas tiun ĉi manieron entrepreni edukadon en la regiono.

Rezulte, la konstitucioj de almena? 11 landoj agnoskas kaj akceptas sian plur-a?-multlingvecon, nome Argentino, Bolivio, Brazilo, Kolombio, Ekvadoro, Gvatemalo, Meksiko, Nikaragvo, Paragvajo, Peruo kaj Venezuelo; kelkaj kiel Ekvadoro, e? evidentigas la multnacian karakteron de la lando; cetere, aldoni?as aliaj kiel ĉilio, Salvadoro, Honduro kaj Panamo, kiuj aprobis regulojn kun malpli da rango, kiuj anka? agnoskas similajn rajtojn, interalie, pri diferenca edukado.

Tiel komenciĉis agadoj por edukado dulingva ĉe indiĉenoj, kun diversaj nuancoj kaj celoj; unue temis pri aspiri je transira dulingvismo kiu donis al la gepatra lingvo la rolon de eta ĉtupo por lerni aliajn lingvojn majoritatajn kaj oficialajn kio permesus aliron al la oficiala eduka sistemo. Tiurilate, oni ne multe progresis, tamen, salutindas pluraj streboj nuntempe okazantaj. Pri la temo ni revenu, ne nur okaze de la internacia tago de la gepatra lingvo la 21-an de februaro.

<https://www.radiohc.cu/eo/especiales/comentarios/312854-okaze-de-la-tago-internacia-de-la-gepatra-lingvo-cu-indigenaj-lingvoj-de-ameriko-malaperas>



Radio Habana Cuba